

(Reviziita) Ĵunko kantas Esperante

1 Feliĉan nasktagon

(Happy birthday to you)

muz. Patty HILL k Mildred J. HILL

trad. JASUI Joŝio

- 1) Gratulon al vi! Gratulon al vi!
Feliĉan nasktagon mi deziras al vi!
- 2) Gratulon al vi! Gratulon al vi!
Agrablan bonsanon mi deziras al vi,
mi deziras al vi!

2 ABC

poez. k muz. JASUI Joŝio

- 1) Nun ni kantu ABC.
Ĉiuj laŭte el la kor'!
Nun ni kantu ABC.
Restu kun ni gaja hor'!
ABCĈDEF GĜHĤIJĴ
KLMNOPR SŜTUŬVZ
- 2) Nun pli vigle kantu ni
nian gajan ABC!
Nun pli vigle kantu ni,
kaj rapide sed ne tro!
ABCĈDEF GĜHĤIJĴ
KLMNOPR SŜTUŬVZ

3 La Lasta Rozo

(The Rose of Summer)

Irlanda popolkanto

poez. Thomas MOORE

trad. Cl. BICKNELL

- 1) Jen la lasta rozeto de fora somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj jam velkis sur ter'!
Ne restas parenco, ne unu roz-flor'
partoprenas komplete en ĝia dolor'.
- 2) Mi ne lasas vin velki tutsole, ho roz'.
Iru dormi kun ili en paca ripoz'.
Nun viajn petalojn diŝjetas mi for
al la viaj kunuloj sen viv', sen odor'.
- 3) Tiel same volonte formortus mi mem,
se ne plu min atendus amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro en tiu ĉi mond'
volus loĝi izole sen amo-respond'?

4 Kanto de la Kvar Sezonoj

(Siki no Uta)

poez. k muz. ARAKI Toyohisa

trad. SUZUKI Joŝihiko

- 1) Jen printempon amas vi kun la pura kor'.
Al violo vi similas, brava kor-amik'.
- 2) Jen someron amas vi kun la forta kor'.
Muĝan ondon vi similas, patro en fortik'.
- 3) Jen aŭtunon amas vi kun la pia kor'.
Revan Hajnon vi similas, bela amatin'.
- 4) Nu, jen vintron amas vi kun la larĝa kor'.
Vastan teron vi similas, milda la patrin'.

5 La Hejmloko

(Hurusato)

poez. TAKANO Tatuyuki

muz. OKANO Teiiti

trad. MIYAMOTO Masao

- 1) Tie leporojn ni ĉasis sur mont',
tie karasojn ni fiŝis per hok';
songas mi ĉiam pli kun sopiro
pri l' rememoro de l' kara hejmlok'.
- 2) Kiel vi fartas nun, patro, patrin'
kaj amikaro de mia jun-aĝ'?
Kuras la penso ĉe vent' aŭ pluvo
ĉiam al fora la hejma vilaĝ'.
- 3) Kiam reiru mi al la hejmlok'
post la sukceso en mondo kun glor'?
Tie la monto plu altas blue,
glaŭkas la fluo kun lira sonor',
glaŭkas la fluo kun lira sonor'.

6 Sed ŝvelos nia esper'

(Kyô no hi wa sayônara)

poez. k muz. KANEKO Syôiti

trad. KONISI Gaku

- 1) Daŭru amikec' inter vi kaj mi sen ĉes'
eĉ se venos kruda sufer'.
Nun disiĝas ni, ĝis revido, amik',
sed ŝvelos nia esper'.
- 2) Kiel blanka gru' flugas en ĉiela blu',
vivos ni en plena liber'.
Nun disiĝas ni, ĝis revido, amik',
sed ŝvelos nia esper'.
- 3) Kresku ĉiam pli la konfido inter ni
kiel polurita juvel'.
Nun disiĝas ni, ĝis revido, amik',
sed ŝvelos nia esper',
sed ŝvelos nia esper'.

7 Ĉi tiun vojon

(Kono Miti)

poez. KITAHARA Hakusyû

muz. YAMADA Kôsaku

trad. JASUI Joŝio

- 1) Ĉi tiun vojon mi certe iris iam.
Ho, jes, mi iris iam.
Jen floras akacioj, ja same kiel tiam.
- 2) Monteton tiun mi certe vidis iam.
Ho, jes, mi vidis iam.
Jen blanka horloĝ-turo, senŝanĝe kiel tiam.
- 3) Ĉi tiun vojon mi certe iris iam.
Ho, jes, mi iris iam.
Mi songe kun patrino kaleŝe iris tiam.
- 4) Eĉ tiun nubon mi certe vidis iam.
Ho, jes, mi vidis iam.
Eĉ herboj de l' kratago sin kline kiel tiam.

8 Al amiko malproksima

(Harukana tomo ni)

poez. k muz. ISOBE Tosi

trad. KONISI Gaku

- 1) Se en vespero dolĉe bela dormas ĉio en trankvil',
de l' amikeco plej fidela al vi flugas kor-sopir'.
(refreno)
Do, bonan nokton, mia kara, ankaŭ en ĉi-vesper'.
Do, bonan nokton, kara, songe mi revidos vin.
- 2) Se en vespero triste bela brilas helaj steloj mil',
de l' amikeco plej fidela al vi flugas kor-sopir'.
(refreno)
- 3) Se en vespero sorĉe bela falas neĝo por inspir',
de l' amikeco plej fidela al vi flugas kor-sopir'.
(refreno)

9 Kion postlasis la viro per la morto

(Sinda otoko no nokosita mono wa)

poez. TANIKAWA Syuntarô

muz. TAKEMITU Tôru

trad. KONISI Gaku

- 1) Kaj kion postlasis do la viro per la morto?
Edzino unu sola, infano senkonsola.
Kaj krome restas post li nenio valora,
ne unu tomboŝtono por signo memora.
- 2) Kaj kion postlasis la virino per la morto?
Velkinta florpatalo kaj bebo sen lulilo.
Kaj krome restas post ŝi nenio valora,
ne unu festa vesto por signo memora.

- 3) Kaj kion postlasis la infano per la morto?
Tordita, eta kruro kaj seka larmo-spuro.
Kaj krome restas post ĝi nenio valora,
ne unu rid-voĉeto por signo memora.
- 4) Kaj kion postlasis la soldato per la morto?
Fusilo disrompita, Ter-globo fuŝbombita.
Kaj krome povis resti nenio valora,
ne unu pec' da paco por signo memora.
- 5) Kaj kion postlasis do la homoj post la morto?
Jen estas mi vivanta, jen estas vi vivanta.
Kaj krome restas vere neniu alia,
kaj krome restas vere neniu alia.

10 La Granda Kantado

(Ôkina Uta)

poez. k muz. NAKAZIMA Kôiti

trad. SUZUKI Joŝihiko

- 1) La granda jen kantado plu,
sonoras nun trans la montar'
la bela son', fortika son',
la granda jen kantado plu.
- 2) La granda jen ĉielo plu,
brilanta sun' nun ridas kaj
rigardas nin kun varma kor',
la granda jen ĉielo plu.
- 3) La granda jen espero plu,
vastiĝas la plezuro nun
en mia kor', en via kor',
la granda jen espero plu.
- 4) La granda jen aspiro plu,
amplena kor' deziras nun
feliĉon en libera mond',
la granda jen aspiro plu.
- 5) La granda jen fortiko plu,
per forto de la laborad'
morgaŭa tag' ŝanĝiĝos ja,
la granda jen fortiko plu.
- 6) La granda jen marŝado plu,
la vera voj' kondukas nin
al paco kaj al amikec',
la granda jen marŝado plu.
- 7) La granda jen mi kaj vi plu,
kun bravo ni ne timas, se
ventegas kaj pluvegas ja,
la granda jen mi kaj vi plu.